UNUA DIMANĈO DE ADVENTO – 27AN DE NOVEMBRO 2011

VIGLU: ĈAR VI NE SCIAS, KIAM VENOS LA DOMOMASTRO – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Marko 13, 33-37

En tiu tempo diris Jesuo al siaj disĉiploj:

«Gardu vin, viglu kaj preĝu, ĉar vi ne scias, kiam estos la fiksita tempo. Tio estos kiel homo forvojaĝinta, kiu lasis sian domon kaj komisiis ĝian gardadon al siaj servistoj. Al ĉiu li donis apartan taskon, kaj ordonis al la pordisto ke li viglu.

Vi do viglu, ĉar vi ne scias, kiam venos la domomastro, ĉu vespere, ĉu noktomeze, ĉu ĉe la kokokrio aŭ frumatene. Gardu vin, ke li, venante subite, ne trovu vin dormantaj!».

Kaj tion, kion mi diras al vi, mi diras al ĉiuj: viglu!".

Jesuo anoncis la detruon de Jerusalemo, simbolo de iu religia institucio kiu, ne nur ne permesis la kunulecon kun Dio sed malebligis al Dio manifestiĝi al la homoj tia kia li estas – nur Amo – kaj Jesuo certigas ke ĉia formo de povo, ĉia formo de reĝimo, estas destinita fiaski. Pro tio, tamen, li petas la kunlaboron de siaj disĉiploj.

Kaj je tiu ĉi punkto Jesuo – ni estas en la evangelio de Marko, ĉapitro 13 versiklo 33 – diras "*Estu atentaj, viglu*", laŭvorte "restu vekaj", "*ĉar vi ne scias kiam estos la momento*". La greka lingvo distingas inter du vortoj por indiki la tempon. Unu estas kairos, kiel estas ĉi tie dirite, la alia estas

kronos, de kiu kronologio. Kronos estas la tempo kiu fluas, tiu de la kalendaro, dum kairos estas la okazo, la taŭga momento.

Kion volas diri Jesuo? La vivo kaj la amo venas renkonte al ni por esti akceptataj laŭ nova, originala kaj kreiva formo. Ekzistas la risko ke, distritaj pro pluraj aferoj, ni ne rimarkas tiun okazon kiu, post kiam ĝi prezentiĝas unu fojon, ne plu revenos. Tiu estis la signifo de kairos, la taŭga okazo, la taŭga momento kiu pasas ke ne plu revenos.

Kaj Jesuo daŭrigas: "*Tio estos kiel homo forvojaĝinta, kiu lasis sian domon kaj komisiis..*" Kaj ĉi tie la traduko diras "la povon al siaj servistoj", sed ne estas tiel. "Sian povon, aŭ pli bone, sian aŭtoritaton al servistoj". Jesuo ne havas servistojn; li tion diris klare en tiu ĉi evangelio ke li ne venis por esti servata, sed por servi. Li do donis sian aŭtoritaton kiu estas la donaco de la Spirito.

Tio estas la kapablo praktiki dian agadon, kiu en tiu ĉi evangelio estas atribuata al Jesuo, ĝi indikas la pardonon de la pekoj, la vivkomunikon, temas pri denunca agado, samkiel tiu kiun Jesuo praktikis en la templo. Jesuo do donis sian aŭtoritaton al la servistoj, "*Al ĉiu li donis apartan taskon*". Kion tio signifas? Estas unu Spirito, sed multflankaj estas la funkcioj. Ni diris ke la vivo kaj la amo petas esti akceptataj por poste esti difinitaj de ĉiu el ni en nova, originala kaj kreiva formo.

Unu nura Spirito do, kiu vigligas la komunumon, sed la funkcioj estas multflankaj. "*Kaj ordonis al la pordisto ke li viglu*". La pordisto estis tiu kiu estis ŝarĝita pri la sekureco de tiuj kiuj estis en la hejmo. Tri fojojn aperas la verbo "vigli", kiu reaperos ankoraŭ en Getsemano, ĉiam trifoje. Ni scias ke la nombro tri indikas tion kio estas kompleta, kaj tiu "vigli" signifas esti solidara en la provo, akcepti la neeviteblan persekuton kiun la anonco de la bona novaĵo, tiu kiu faligos la reĝimojn kaj ĉiun regoformon, alportos.

Estas nature ke, kiam la povo estas minacata ĝi ne restas trankvila, sed eksplodigas sian tutan malamon kaj sian tutan perforton. Kaj jen do la nova invito de Jesuo: "*Vi do viglu, ĉar vi ne scias, kiam la domomastro*", tio estas la sinjoro de la domo. Kaj ĉi tie Jesuo dividas la nokton en kvar partojn, laŭ la romia kutimo. Tio komprenigas ke lia mesaĝo ne estas destinita aŭ rezervita nur al la hebrea popolo, sed estas malfermata al la tuta homaro.

"*Gardu vin, ke li, venante subite*", kio signifas iun enrompon kiu ne lasas la tempon por ŝanĝi, por ĝustigi, "*ne trovu vin dormantaj*". Precize kiel okazos male en Getsemano, kie ĝuste la disĉiploj kiujn Jesuo estis elektinta, tiuj kiuj estis sin deklarintaj pretaj morti kun li, je la vido de la suferado kiu estis alvenonta, ĉiuj foriris. Kaj ĉiuj lin forlasis.

La komunumo do, kiu memorigas la fiaskon pro tio, ke ĝi ne estis solidara kun Jesuo, metas en tiu anonco de Jesuo la inviton esti ĉiam pretaj akcepti ankaŭ la neeviteblan persekuton kiun la anonco de la bona novaĵo implicas.

"*Kaj tion, kion mi diras al vi, mi diras al ĉiuj: viglu!".* Tiu do kiu estis la tasko de la pordisto, nome respondeci pri la feliĉo de tiuj kiuj estis en la domo, tiu estas la tasko de ĉiu individuo ene de la kristana komunumo.